

Prof. MIECZ. SYGNARSKI
Ex Libris L. 149

Nro 1

Pola

Esperantisto

XXXI JANUARO
JARO 1937

Esperantysta Polski

ELDONANTO WYDAWCA POLLANDA ESPERANTO-DELEGITARO
REDAKTANTOJ PROF. DR ODO BUJWID — MGR TAD. HODAKOWSKI
REDAKTORZY

APERAS LA 1-an DE CIU MONATO. REDAKCIAN MATERIALON ONI PETAS SENDI GIS LA 20-a DE
CIU MONATO. LA REDAKCIO ESTAS RAJTIGITA LA U BEZONO SANGI LA TEKSTON DE MANUSKRIPTOJ.

PROF. DRO O. BUJWID

LA IX. BRAZILA ESPERANTO-KONGRESO EN RIO DE JANEIRO

Mi malfruiĝas kun mia raporto. Sed tio estas memkomprenebla. Ni estas ĉi tie malproksime de Eŭropo.

Niaj leteroj atingas Eŭropon ne pli frue ol post 20 tagoj.

Krome mi devas konfesi, ke Brazilo estas por mi speciale interesa lando. Lando de granda estonteco, kie disvolviĝas novaj ideoj, novaj sentoj, novaj pensoj.

Granda estas la diferenco de diversaj aspektaĵoj en Eŭropo kaj en la lando de Suda Kruco. Ĉe ni estas nun frostoj — ĉi tie regas plena somero. La suno brilas kaj brulas, bruligas korpojn de aroj da homoj banantaj sin en bluaj ondoj de nepriskribebla hela Copacabana, kien vojaĝas en tiu tempo multegaj riĉuloj el la tuta mondo. Ĉu mi ankaŭ estas riĉulo? Nur esperantisto.

En Eŭropo malgajigita de sangajoj de kontraŭfrata batalado regas nuboj de necerteco pri morgaŭa tago — en Brazilo ĉiu loĝanto sentas veran ĝojon de la vivo. Li vivas malmultekoste. Du zloty tage sufiĉas por bona vivado.

Ĉi tie eĉ 80-jara maljunulo rejuniĝas kaj sentas deziron vivi kaj labori kaj fari ĉion eblan por plifaciligi la vivon de

aliaj samlandanoj kiuj suferas de malĝojo.

Alveninte Brazilon mi sentis min en la unua momento vere ebrigitita.

Post 8-jara foresto mi revidis miajn amikojn brazilajn kaj polajn, kiuj kolektiĝis antaŭ la bordo de alveninta pola ŝipo Kościuszko, kiu la unuan fojon alvenis ĉi tien.

Kara prezidanto de Brazila Esp. Ligo Dro Couto Fernandes, Carlos Domingues, Porto Carreiro Neto, Braga, kaj multaj aliaj.

Memkompreneble post la koregaj salutoj — komuna fotografado. Tuj poste gastama akcepto en la sidejo de Pola Legacio, kie Ministro Dro Tad. Grabowski akceptis nin ĉiujn kiel amikan jam de longe konatan rondon.

Mi ekscias, ke Brazila Registaro tre favore akceptis esperantan movadon kaj ĉiurilate plifaciligas la Kongreson.

Sinjoro Ministro de Eksterlandaj Aferoj Dro Carlos de Macedo Soares oferis por la Kongreso sian sidejon, palacon de Itamarati kaj por laborkunsidoj la bibliotekan salonon de tiu ĉi palaco.

La Ministro de Poŝtoj kaj Telegrafoj eldonis specialan esperantan kongresan

poŝtmarkon, kaj aron da belege ilustritaj poŝtkartoj, kun esperanta klariga teksto.

Dum la tuta monato la estraro de la Kongreso rajtas sendi al ĉiuj kongresanoj senpage telegramojn koncernantajn la kongresajn aferojn.

Ĉu oni povas imagi pliajn faciligojn?

Ne, ankoraŭ ne ĉio. La Ŝtata Presejo prizorgas senpage ĉiujn presaĵojn kaj eldonas gvidlibron pri Rio de Janeiro.

En tiu atmosfero ni laboradis dum la tuta tempo. Esperanto vere triumfas en la sunplena Lando de Cruzeiro.

Dum la malferma kunsido kiun prezidis Konsulo Joao de Guimaraes Rosa, reprezentanto de Ministro de Eksterl. Aferoj, la unua oratoro s-ro Domingues Barbosa laŭdegis Esperanton, kiel gravan plifaciligon en la internaciaj rilatoj.

Dum preskaŭ 50-jara ekzisto Esperanto pruvis sian taŭgecon por iĝi sola dua lingvo por ĉiu nacio. Neniu nacia lingvo povas iĝi lingvo komune uzata de ĉiuj. Nur Esperanto, ĉar ĝi estas tute neutrala.

Post tiu parolado en lingvo portugala, ĉiuj aliaj ĉeestantoj parolis Esperante. Tre sprite kaj kompreneble por ĉiuj parolis s-ro E. Backhauser, prezidanto de la Kongreso, profesoro de la Politeknika Altlernejo. Li tiel lerte miksis Esperanton kun portugala, ke ĉiuj ĉeestantoj komprenis kaj forte aplaudis la paroladon.

Brazilan kaj esperantan himnojn kantis virina ĥoro bonege aranĝita. Ĉiuj nesesperantistaj gastoj multe kaj serioze priparolis la valoron de Zamenhofa verko. S-ino May de Couto salutis la Kongreson en la nomo de Nederlando.

La sekvantan tagon oni laboris en la Biblioteko de la Ministerio. Oni tralegis multajn leterojn kaj telegramojn ricevitajn de multenombraj eksterlandaj kaj brazilaj esp. societoj kaj asocioj. Inter aliaj de s-ro Przewodowski, konata parlamentano, de s-ino Fortey el Anglujo k.a.

Oni starigis postulon klopodadi ĉe la Brazila Registaro pri deviga enkonduko de Esperanto en la lernejojn.

Dum la kunsido prof. Bujwid klarigis al la ĉeestantoj la nunan situacion de UEA kaj IEL. Post tiu klarigo la Brazila Esp. Ligo decidis unuanime aliĝi al IEL.

Vespere je la 9-a horo oni festis la 30-jaran jubileon de la dekreto, en kiu la Administracio de Brazila Poŝto kaj Telegrafo deklaris la lingvon Esperanto „klara lingvo”. En tiu direkto Brazilo antaŭigis aliajn landojn. Nun devas sekvi

alia grava paŝo — enkonduko de deviga instruado de Esperanto en lernejojn. Brazilo, la lando de „Ordem e Progreso” — kiel estas skribite sur ĝia standardo — sendube tion faros.

Dimanĉe en la katolika preĝejo de S-ta Antonio pastro Felicio Magaldi celebris la diservon kaj dum evangelio parolis pri valoroj de Esperanto kiel helplingvo en internaciaj rilatoj.

La balotado al estraro de Esp. Brazila Ligo donis jenan rezulton: Elektitaj estas Dro Alberto Couto Fernandes kiel dumviva prezidanto, Dro Carlos Domingues — vicprezidanto, Dro Porto Carreiro Neto — ĝenerala sekretario, s-ro Mario Braga kaj s-ino Irany Baggi de Araujo — sekretarioj, fine s-ro Odylo Pinto — kasisto.

La ferman kunsidon de la Kongreso inaŭguris persone la Min. de eksterlandaj aferoj s-ro dro Jose Carlos de Macedo Soares, elektita honora prezidanto de la kunsido.

La skribinto de tiuj ĉi linioj oferis al la Brazila Esp. Ligo kiel memorajon — grandan fotografajon kun bildo de la kreinto de Esperanto Dro L. Zamenhof en la mezo de liaj kolegoj. La bildo estis farita en la jaro 1909 okaze de la 25-jara jubileo post la fino de komunaj universitataj studoj en Varsovio.

La Kongreso elektis la aŭtoron de tiu ĉi artikolo honora prezidanto de Brazila Esp. Ligo.

La Kongreso finiĝis per koncerto organizita de Majstro Quirino de Oliveira.

Brila estis la sukceso de la Kongreso. Oni povis rimarki multajn personojn, diskutantajn pri valoro de Esperanto, kiu jam travivis duonon da jarcento, ne timante ian ajn malhelpon. Nia movado, kvankam ne rapide, iras tamen antaŭen.

Menciindaj estas kelkaj aranĝoj, kies celo estis pliagrabligi kaj plisolenni la kongreson. Interalie mi jam menciis la specialan akcepton en la palaco de la Legacio aranĝitan de s-ro Ministro Dro Tadeusz Grabowski. Ne mankis ankaŭ ekskursoj kaj vizitadoj ekz. ekskurso al grandioza Monte d' Asukar, vizito al insulo Paquete.

Longe restos en la memoro de la partoprenintoj la belega Brazila Esp. Kongreso.

Post la kongreso mi vizitis S. Paulo, kie estas fervoraj samideanoj s-roj Brito kaj Fosca kaj Curityba, kie loĝas kaj laboras s-ro Turek (lia patro estis Polo), parolanta nur portugale kaj esperante.

PROPAGANDO DE ESPERANTO

UTILA METODO

Ĉiu Esperantisto bone scias, ke penante propagandi nian lingvon oni tre ofte aŭ renkontas indiferecon aŭ ricevas la respondon, ke ĝi estas senvalora. Ekzistas tamen, multaj rondoj al kiuj oni povas sufiĉe facile montri kun kontentigaj rezultoj, la utilecon de la lingvo. Temas pri ĉiuj internaciaj organizaĵoj, kaj precipe tiuj societoj, kiuj laboras por pacaj celoj, kiel ekzemple: Unuiĝoj por la subteno de la Ligo de Nacioj, internaciaj kulturaj asocioj, Internacia Amikeca Ligo, Rotarianoj kaj preskaŭ ĉiuj internaciaj fakaj asocioj. Jen propono, laŭ kiu oni povas pruvi al tiaj organizaĵoj, ke Esperanto vere funkcias.

Delegito, kiu estas preta labori propagandcele, interrilatu kun loka filio de taŭga neesperantista organizaĵo por klopodi instigi ĝin al korespondado kun similaj filioj en aliaj landoj. Preskaŭ certe la societo konstatos la malhelpon de la lingva barilo. La Delegito, do, proponu, ke la letero estu skribota en la nacia lingvo. Li tradukos ĝin en Esperan-

ton kaj redonos ĝin al la societo kune kun la adreso de la Delegito en, aŭ proksime al la loko kien la letero estas sendota, kun indiko ke tiu Delegito traduku la leteron en sian nacian lingvon kaj liveru ĝin al la koncerna societo.

Rezultas, ke en la du lokoj la membroj de la respektivaj societoj ricevas pruvon, ke Esperanto vere estas jam nun utiligebla, kaj plej kredeble oni povos instigi al kelkaj membroj, ke ili lernu la lingvon. Se ni uzus tiu rimedon grand-skale, la rezultoj sendube estus treege valoraj por nia movado.

La propaganda filio intencas baldaŭ dissendi al la landaj asocioj per cirkuleroj kelkajn novajn proponojn, celante fondi intiman kontakton kun diversaj neesperantaj fakasocioj. Sed bonvolu unue trakti la proponojn jam faritajn dum la Viena kongreso. Speciale ni petas vin atentigi la helpon al la skoltoj por krei eblecon venki tiun movadon!

(El „Oficiala Bulteno” de IEL.)

Al pastro Andreo Cseh pro lia jubileo.

En la tago de Via jubileo de kvarcentjara senlaca laborado por Esperanto la pensoj de la gesamideanaro de la tuta mondo estas direktitaj al vi.

Vi kiu ne apartenas al iu ajn lando, sed al la tuta Esperantujo, fariĝis por ni ĉiuj, ĉu malnovaj spertuloj, ĉu novaj adeptoj, neatingebla ekzemplo de laboro por nia sankta afero.

La mirindajn rezultojn de Via laborado ni dankas al Via energio, ĉiama juneco de l' koro kaj al via granda amo al la malfeliĉa homaro.

Por vi Esperanto ne estas nur praktika ilo, destinita por komercistoj, por vi Esperanto estas i d e o, estas io tre nobla kaj alta, valoranta penon, laboregon kaj sinoferon.

En la nunaj malgajaj tempoj, kiam la homaro dronas en materialismo, kiam

la plej altaj idealoj senkompate estas dispremataj per botegoj, kiam eĉ en la Esperantan mondeton oni provas transplanti rompado de juro, de bonaj moroj kaj prediki eĉ malfidelecon al altaj Zamenhofaj idealoj, vi kara pastro, per via modesteco, senbrua persista laborado, fideleco kaj mildeco montras al ni, kiel oni devas agi por nia justa afero.

El Polujo, la lulilo de Zamenhof kaj de liaj lingvo kaj ideo, kie nun estas preparata por 1937 grandega festo de la Esperantujo flugas al vi en la tago de Via jubileo plej koraj gratuloj kun ardaj deziroj, ke Vi konservu ankaŭ por Via 50-jara agadjubileo sensanĝe junan koron, sanon kaj neelĉerpeblan energion por bono de nia afero kaj de la tuta suferanta homaro.

J. Sapiro.

ALVOKO AL UEA KAJ IEL.

Kiam ni legas pri decido de Svisa Tribunalo en la afero de U. E. A. ni ne povas reteni amaran rideton. La situacio proksimume analogias al geedza paro en apartiĝo, en kiu unu el geedzoj malfideliĝis kaj ekloĝis aliloke. Juran ekscediĝon ili ne ricevis, sed tio ne malhelpas al plua apartiĝo. Rusa proverbo diras — „perforte vi ne amindiĝos” kaj ĉi-okaze estas simile. Ĉiu parto havas sian pravecon kaj ambicion. Ĉiu siamaniere klarigas la situacion favore por si mem kaj dume la disrompo inter la esperantistaro ne malgrandiĝas. Estus pli bone se ĝi estus klare dividiĝinta je du partioj. Sed tiel ne estas. Estas multego da esperantistoj, kiuj ŝanceliĝas en tiuj du kontraŭaj fluoj kaj simple atendas ĝis kiam la aferoj klariĝos. Tiu ĉi oportunisma metodo — la sama, kiun la mondo ĝenerale aplikas al ni — ne rajtas havi lokon en nuna situacio antaŭ la jubileo.

Ĉiu konscia esperantisto devas tion kompreni. Sed fine ja devas esti ia eliro el tiu ĉi groteska situacio. S-ro Ir. J. R. G. Isbrücker rekomendas al ni fari finon. Jes, tio estas postulo de l' momento. Sed se ni demandos nin laŭ konsilo de D-ro Mędrkiewicz, ĉu IEL donos garantian pri utileco de sia agado — ni devas saman demandon fari rilate al UEA. Garantio estas nebla. Ĉu ni povas doni en unu el ambaŭ okazoj pozitivan respondon kaj se jes — do kial, Ni imagas, ke UEA reprezentas tiun jure

DRO JAN MĘDRKIEWICZ

Post Oficiala Bulteno de IEL aperinta en pasintjara septembro, antaŭ okuloj de esperantistaro en novembro montriĝis kiel Nro 432. „Esperanto” el Genevo. Fakte preskaŭ ne atendata, ĉar tiom multe nia publiko en la lasta tempo aŭdis pri morto, vivnebleco de UEA en Genevo. Dume la faktoj montris la kontraŭon. Aperinta post la fama krizo, ĉu skismo numero de Esperanto aspektas tute ne malpli bone ol en pasintaj bonaj tempoj, kaj eĉ estas iom pli diketa ol kelkaj numeroj antaŭ la krizo. Ankaŭ la enhavo estas vere interesa. Grandan impreson faras du verdiktoj de svisa Tri-

pensantan parton de esperantistaro kaj IEL — tiun alian. Sed ni devas al ni klare konsciigi, ke Nacia Svisa Tribunalo ne povas solvi la aferon diskreskintan laŭ supernacia skalo. Ĝi devas subigi al sia nacia leĝaro, sed tio estas formalajo de ekzisto, sed alia do devas esti interna esperanto-percepto reganta en aferoj de supernacia movado. En tiuj aferoj koncernantaj utilon kaj bonon de nia movado, laŭ ni ne estas kompetenta en momento de konflikto — Nacia Tribunalo, sed ia speciale kreita Arbitracia Komisiono, konsistanta el esperanto-eminentuloj, Entiri en nian konflikton la Tribunalon, laŭ ni, ne estis ĝusta procedo el vidpunkto de pure esperanta etiko. Unu solvo ekzistis — ĉesigi jurprocecon. Tion faris fondintoj de IEL, sed sian parton ne faris iliaj kontraŭuloj. La nuna verdikto estas nun por UEA objekto de fiero, sed ĝi estas ŝtono en vundo de nia esperantista organismo, kiun ni plej baldaŭ devas eltiri kiel dolorantan denton. Solvo ne kuŝas en ia plebiscito, en kiu la malplimulto povos malagnoski la rezulton kaj formi apartan asocion, sed en plena konkordo.

Do nia konkreta propono: la likvido de l' situacio estu aranĝita ne en maniero plebiscita, en kiu diboĉadus diversajn metodojn uzanta kaj multekosta propagando, sed per simpla Arbitracia Konferenco urĝe kunvokota de UEA kaj IEL plej malfrue ĝis Pasko de 1937.

Inĝ. M. Chmieliński.

A V E R T O.

bunalo. Per unu estas nuligita la decido de la estinta estraro de UEA (22 marto 1936) pri transporto de l' sidejo el Genevo al Londono. Per la dua verdikto estas nuligita la delegita voĉdonado pri la sama temo. Kaŭze de tiuj ĉi du malgajnitaj procesoj, la estinta estraro estas kondamnita je 343.70 sv. fr. Laŭ statuto de UEA tiu ĉi monsumo devas esti pagita el privataj poŝoj de la kulpuloj.

Interesa estas, kion parolas f-ino Lidja Zamenhof, apoganta per siaj saĝaj, logikaj kaj trankvilaj vortoj malnovan UEA, kontraŭ IEL. Sed plej interesa estas mesaĝo de nove formita provizora

Komitato de UEA direktita: Al la Esperantistaro. Ĝi detale kaj ekzakte prezentas historion de la krizo kaj skismo, pri lumante multajn antaŭe por esperantistaro malhelajn momentojn. Samtempe ĝi informas pri restarigo kaj ekfunkciigo ne nur de oficejo de UEA, sed ankaŭ de la apartaj servoj kiel: bibliografia, ekspozicia, gazetabona, hotela, komerca, kongresa, libroserva, propaganda, reklama, respondkuponaj kaj turisma. Ni do vidas, ke la mortkondamnita kaj laŭdire ne plu vivkapabla UEA montris neatenditan vigecon kaj energion solvi ĉiujn vere grandajn malfacilaĵojn, kaŭzitajn per subita forlaso de la Asocio flanke de preskaŭ tuta Komitato. Tiam neatenditan vigecon eĉ IEL ne montris. ĉar laŭ ĝia Oficiala Bulteno nur **libroservo** estas provizore organizita. Do ensume la impresoj, kiun faras la historia Nro 432. de „Esperanto” estas altnivela kaj sendube bone respegulas intencojn kaj animstaton de fidela esperantistaro.

Dume ni rigardu la kontraŭan tendaron. Samideano Isbrücker el Haag, kiu komence aprobis transporton de UEA al Londono, nun nomas la situacion **ĉagreniga skandalo**, kaj aranĝas kvazaŭ privatan plebisciton por fari finon, nuligi la skismon, reunuigi ĉiujn en ununura organizajo.

Verdire samideano Isbrücker mem ne donas indikon klaran, kian organizaĵon preferu elekti, tamen la **fakto** mem de skismo en Esperantujo indignigas lin nun.

Novaj komunikoj anoncas, ke al IEL aliĝis kelkaj novaj landaj asocioj. Verŝajne tio okazis pro konsekvenco, ĉar jam dum la Viena Kongreso apartaj komitatanoj ne nur en sia privata nomo voĉdonis por Londono, sed supozeble laŭ esperata opinio de siaj landaj asocioj. Kiom la afero estas al mi konata ili ne havis mandaton de siaj asocioj por Londono, sed videble la komitatanoj supozis, ke landaj asocioj samopinios kun ili ex post. Do ne estas afero mirinda, ke vienaj komitatanoj nun zorgas altiri al IEL en Londono siajn asociojn. Ekzemple tiel okazis pri Pollanda Esperanto-Delegitaro. La estraro de PED unuvoĉe akceptis proponon aliĝi al IEL, sed sam-

tempe la sama estraro konforme al normoj de la **statuto** devas akiri aprobon de sia decido per voĉdonado de ĉiuj apartaj polaj societoj. Konante bone la agordojn inter pola esperantistaro mi esperas, ke la voĉdonado de la societoj rezultigos negativan sintenon koncerne la aliĝon al IEL. La samo povas okazi en ĉiuj landaj asocioj, se nur la afero estos bone klarigita al la membroj en apartaj societoj. La afero estas tiom grava, ke estas necese doni al esperantista popolo la eblecon trastudi la tutan aferon kaj laŭ akirita vera informmaterio decidi: ĉu resti ĉe manolva UEA en Genevo, kiu tute ne mortis, kontraŭe eĉ bone fartas, ĉu aliĝi al nova IEL en Londono.

Rilate Jubilean kongreson en Varsovio. Tio estas aparta temo kaj tre delikata. Ni ne provu pro internaj esperable nur momentaj malpacoj misinflui sukceson de nia Universala Jubilea Kongreso. Ĝi kontraŭe devas manifesti antaŭ la tuta mondo nian forton kaj nian tutan akiraĵon post 50-jara persista laborado jam de du generacioj. Por tiu ĉi kongreso devas esti preparitaj projektoj pri Internacia Lingva Traktato kaj por tiu ĉi ideo devas esti akiritaj regneregistaroj en la tuta mondo, por ke kun ilia helpo estu realigata nia devizo pri deviga instruado de Esperanto en lernejoj tra la tuta mondo. Tial la plej multnombra alveno de tutmonda esperantistaro al Varsovia Kongreso, al tombo de nia Majstro, estas morala kaj ĉefa aktuala esperantista devo de ĉiu vera samideano.

(Rim. de la Redakcio. La legantoj konas nian opinion pri la problemo tuŝita en la artikolo de Dro Mędrkiewicz, ĉar ni ĝin jam kelkfoje malkaŝis. Nia devizo estas: Respektu la decidon de la Estraro de P.E.D. rilate la demandon pri nia centra organizo. Sed ni ne povas forgesi, ke nia gazeto estas destinita por ĉiuj esperantistoj en Polujo, kaj pro tio ni devas disponigi niajn kolonojn ankaŭ al tiuj samideanoj, kies opinioj pri tiu aŭ alia esenca problemoj de nia movado ne akordiĝas kun nia propra vidpunkto).

DRO LEOPOLD DREHER.

LINGVA ESPLORO.

De s-o Rollet de l' Isle, la prez. de la Akademio mi ricevis jenan novan leteron, kiun mi konigas, esperante, ke s-o Rollet de l' Isle ne riproĉos min pro tio:

„Mi legis en Pola Esperantisto vian respondon al mia letereto.”

Via metodo estas bazita sur tiu ideo, ke **ata** montras fakton kaj altiras atenton al ĝi, dum **ita** montras kvaliton. Nu, tiu signifo estas ĝis nun montrata en neniun lernolibro, kaj ne rezultas el la difino de tiuj formoj: **ata** montras **staton** de la subjekto **dum** la ago, kaj **ita** **post** la ago.

Sekve, ne sufiĉas via **intenco** por ke la leganto, resp. aŭdanto, komprenu ĝin: tiu intenco devas esti montrata de la teksto, per montrado de momento de la ago. Jen la kaŭzo de ĉiuj eraroj ĝis nun faritaj, kaj de la opinio de kelkaj kompetentuloj, ke Zamenhof uzis nelogikajn formojn — ĉar ĉiam li montris la momenton, kiam li uzis: estis -ata.

Ekzemple nia kolego Isbrücker diris al mi, ke Zamenhof uzis ofte nelogikajn formojn ekz. en la frazo: **E n t i u t a g o e s t i s c i r k u m c i d i t a A b r a h a m.** Nu, ĉar la operacio ne daŭris la tutan tagon, oni ne povas uzi **ata**, kiu montras, ke Abraham suferis la tutan tagon!

Cetere via metodo ne havigas certecon, ĉar al la demando **kio okazis?** oni, en via ekzemplo povus respondi: **emo-cio de Z.**

Mi bedaŭras, ke vi ne petis D-on Lippmann sciigi vin pri sia motivo preferi **ita** en la frazo: **Dro Z. estis ekscitita**, ĉar prefero ne sufiĉas por pravigi regilon.”

AMIKAJ PARODIOJ. (I.)

Henryk Gielb: Nordaj Gandoj kaj Popoloj.

(Komp. „Pola Esp.” No 12/1936 pĝ. 153)

Mi saltis, leginte kun indigno en „Heroldo” la refuton de s-ro redaktoro Pisarski, kiu kuraĝas aserti, ke ne mi konvertis lin al Esperanto kaj ke ne mi estis tiu, kiu al militis la tutan polan gazeton por kaj kontraŭ Esperanto.

Mi saltis en la vagonon, sed mi restis en la pordo, ĉar mi ne povis ne montri

La ĵus citita artikoleto de la prezidanto de la Akademio montras, kiom malfacila estas la problemo pri **ata** kaj **ita**. Mi opinias, ke estus vane plu diskuti pri la problemo. Tial mi kontentigis min ĉi foje per sola cito senkomentaria de la opinio de nia prezidanto. Al interesiĝantoj mi volas komuniki, ke mia opinio tre similas al tiu de s-o Waringhien, publikita en la Enciklopedio de Esperanto.

La diferenco inter mia opinio kaj tiu de s-ano Waringhien konsistas en tio, ke s-ano Waringhien dividas la verbojn en Esperanto en 3 kategoriojn, nome 1) rezultaj, 2) daŭraj, 3) daŭraj kaj rezultaj. Mi mem dividis ilin en nur 2 kategoriojn, pri kio oni relegu en P. E.

Ekz. laŭ Waringhien oni devas diri: La katedralo estis konstruita en 1888 (lia kategorio 3.), dum laŭ mi sufiĉas: konstruata. Waringhien pensas, ke se li dirus: la katedralo estis konstruata en 1888, oni ne sciis, ĉu la konstruado estis nenur komencita, sed ankaŭ finita en la daŭro de la citita jaro 1888.

La angla **has been built**, germana **wurde gebaut**, franca **a été construit**, pola **został wybudowany** povus eble tradukiĝi plej ekzakte per: **ĝis konstruita**.

Kaj tamen mi opinias, ke **estis konstruata en 1888** ne lasas dubon pri tio, ke la konstruado estis preta en 1888. Nur tiel ni lasas al **estis konstruita** ĝian ĝustan lokon kiel esprimon de tempo antaŭa antaŭ ol okazis alia ago en la sama propozicio, Manko de diferenco inter tempo historia (perfectum) kaj tempo antaŭa (plusquamperfectum) estus grava malriĉigo al nia lingvo.

min ankoraŭfoje al la tuta loĝantaro de la estona urbeto Tartu, kiun mi esperantigis dum kvin minutoj kaj kiu dankemvenis min adiaŭi.

Baldaŭ la malluma nokto estis jam englutinta la vagonaron, sed en la malfermita pordo ĉiam ankoraŭ la tartuanoj kaj precipe la tartuaninoj vidis aŭ ima-

gis de malproksime mian sveltan, allogan figuron.

Sed jam min atendis novaj sukcesoj spite al asertoj de Pisarski. Juna, 18-jara knabino staris apud mi ĉe malfermita pordo. Nur nun mi turnis la atenton, ke estas por ŝi danĝere stari ĉe malfermita pordo.

Mi diris al ŝi, ke mi ne ŝatas, kiam oni pro mi saltas el fervojvagono. Per malĝoja voĉo ŝi respondis:

— Ho, volonte mi saltus el la vagono pro ĵaluzo, ĉar en apuda kupeo atendas vin varmaj kisoj de alia knabino!

Mi rezignis grandanime de tiu ofero, fermis la pordon, kaj — lasinte ŝin por eventuala posta amkonkero — eniris aluditan de ŝi kupeon.

Kovrita per mantelo kuŝis tie ino, vidigante nur belegan, kiel artiste skulptitan, piedeton.

En la sama momento ŝi forigis iom la mantelon de la vizaĝo kaj, ekvidinte min, kun ega plezuro per brilanta okulparo mezuris min de l' piedoj ĝis la kapo.

„Pardonu”, mi diris ruze, sed ĝentile, „ĉi-tie estas nur por virinoj?”

Anstataŭ respondo ŝi per sia maneto, ankaŭ nemalbone skulptita, montris lokon apud si.

Ŝi kuŝis en libera pozo kaj mi sidis apud ŝi. Ju pli mi rigardis ŝin, des pli ŝi plaĉis al mi. La ĉasisto, kiam li ekvidas belan birdeton, ne nur li neniam ĉesas, sed li eĉ de loko ne moviĝas por ne fortimigi la belan aperaĵon, kiun li rigardas sopire. Kaj mi ja estas mondkonata virinĉasisto. Kiu neniam ĉesas, sed eĉ de loko ne moviĝas.

Rigardante min, mia najbarino evidentigis nekaŝitan kontenton. Si demandis min, kiu mi estas. Mi montris al ŝi la legitimilon de la jura fakultato de la universitato, ĵurnalian karton de „Heroldo de Esperanto”, fervojan bileton, ateston pri naskiĝo, baptito, fraŭla stato kaj pri la ĝisnunaj am-kaj Esperanto sukcesoj. Si malfermis la buŝeton kaj ĝoje ridetante, vokis:

— Kia hazardo, kia bona signo, vin mi ja serĉas de preskaŭ du mil-jaroj! En ia pasinta vivo vi estis ja Cezaro, dum mi estis Kleopatro. Fine mi vin trovis. Ave, Caesar Gelb, kisontino vin salutas!...

— Fraŭlino! — mi diris. Vi eraras! Mi ne estis Cezaro, mi estis Napoleono la Granda. Montru la legitimilon, ke vi

estis Kleopatro, aŭ pli-ĝuste Kleo-patino!

Siaj etaj manoj rapide malfermis malgrandan valizeton, prenante legitimilon.

— Legu — ŝi diris.

„Tanja...”, mi eklegis.

— Ha, fraŭlino! — mi diris. Mi kredis, ke vi estas Jozefino, ĉar mi ja tamen estis Napoleono. Sed se vi prezentas legitimilon por la nomo de Tanja, kiu estas samsignifa kun Tatjana, tiam mi devus esplori, ĉu mi ne estis iam ankaŭ Eŭgeno Onegin. Atendu momenton!

Kaj por bone pripensi la aferon, mi tute malfunkciigis mian pensaparaton. Kiam ĝi reekfunkciis, Tanja tenis min en siaj brakoj. Ĉirkaŭ mia kolo estis kunplektitaj ŝiaj etaj dolĉaj manoj kaj sur miaj lipoj mi sentis la aromajn, ĉerizokolorajn lipetojn de Tanja - Tatjana - Jozefino - Kleopatro - Evo, la prapatrino.

Poste mi trovis en mia notlibro jenan frazon: „Tanja, ŝajniganta sin Kleopatro, tamen inteligenta, kiel mi (preskaŭ), matura (same), kaj konscioplena homo kisis min dum du horoj seninterrompe, komencinte je 24,14 kaj fininte je 2,15, kion por nekredemuloj el la varsovia esperantistaro ŝi konfirmas ĉi-sube pramane.”

Poste ni disiĝis denove por iaj mil-jaroj. Sed antaŭ la finpreso de tiu-ĉi artikolo mi ricevis de ŝi leteron: „Jes, vi estas prava, vi tamen iam estis Napoleono la Malgranda. Ĉar la Granda estis Dro Rosenstock kaj li ne rakontadis publike en la Esperanta gazetaro pri siaj amsukcesoj”

Tanja estas strangulino. Aŭ ŝi infektiĝis de Pisarski per ĝustigemo aŭ ŝi estas nordlanda virino...

Joŝo.

OBNIŜKA ABONAMENTU!

Kaŭdy abonujacy na rok 1937 miesiecznik „Pola Esperantisto” wplaca do dnia 31 stycznia 1937

t y l k o . z ł 7.50.

Po tym terminie abonament wynosi z ł 8.— rocznie.

Korzystajcie se zniżki!

Równocześnie komunikujemy, iż zalegającym z wpłatą abonamentu za rok 1936 wstrzymujemy wysyłkę miesięcznika z dniem 1 stycznia 1937. Prosimy więc uprzejmie o wyrównanie zaległości.

HENRYK GIELB.

O M B R O J . . .

(Skizo)

Grandega konstruajo, la kvinetaĝa studenta hejmdomo, leviĝas el la blanketa nebulo, ĝi leviĝas alten, supren...

La tegmento — fenestretoj, kvazaŭ argus-okuloj, scivole rigardas la serpente fluantan Vistulon.

Centoj da fenestroj de l' domego jam nigriĝis, la lumo estingiĝis, la ĉiam aŭdiĝanta bruado jam delonge ĉesiĝis.

La starhorloĝo en la vestiblo ekfrapis kvar kvaronojn kaj du pli fortajn fra-pojn. 2-a horo post noktomezo.

Densa, nepenetrebla mallumo kaj silento envolvis la longaju koridorojn.

La loĝantaro dormas profundan dormon, kvazaŭ enlulita de tuttaga lacego. Ĉambro 333.

La mallaŭta susurado eliĝas en la koridoron sur la tria etaĝo. La malgranda fenestro super la pordo de la ĉambro estas kurtenita, apenaŭ oni povas rimarki la lumon interne de la ĉambro.

— Franjo — ekaŭdiĝis vira, karesema voĉo — Franjo, ĉu vi scias la horon?...

Enrigardante tra la vualita fenestreto, oni povas rimarki ombrojn de siluetoj.

Sur nesternita lito, apogite al malhela vando, vidiĝas du kapoj: junula kaj junulina...

— Franjo — ree interrompis la junulo — trankviliĝu mia kara, se ne hodiaŭ, eble morgaŭ, eble iom poste, — lecionojn vi ricevos, vivrimedojn vi trovos, ne ĉagreniĝu, ne valoras suferi...

Via sorto ne estas favora, sed tamen, — trankviliĝu karulino...

Franjo restis tamen silenta. Sia helforma frunto estis kaŝita en la etajn manetojn, la ruĝ-blankaj vangoj estis pli palaj ol kutime, — nur unuloke estis malpli hela sulko, kies vojon, de tempo al tempo, ruliĝis perla guteto, brilanta lar-melo...

Ludoviko enpeniĝis; liaj pensoj retiriĝis al la momento, kiam li estis la unuan fojon ekkoninta Franjon.

Kelkaj jaroj pasis de tiu tempo. Si estis tiam gimnaziano. Iom poste ŝi rakontis al li, pri la malbona materiala stato de siaj gepatroj. Ŝi tamen estis iel fininta gimnazion kaj ekfrekventis universitaton. Tiam komencis Franjo mal-

facilan, sed memstaran vivovoĵon. La gepatran domon ŝi devis forlasi, por cedi la mizeran lokon al pli malaĝaj gefratoj. Poste venis krizo...

La privataj lecionoj elĉerpiĝis, enspezlaboro ĉesiĝis, venis mizero.

La eta Franjo tamen neniam perdis esperon nek humoron. Ŝi estis ĉiam ĝoja kaj vivoplena. La energio neniam ŝin forlasis, la batalado por ekzisto ĉiam aldonadis al ŝi novajn fortojn, — apenaŭ sata, ŝi forte kredis je tempoj pli bonaj kaj pli favoraj...

Kaj nun — Ludoviko rigardis tiun belan estajon, duon-kuŝantan sur lia studenta lito, kaj li tiom maltrankviliĝis, ke li ne plu povis ŝin demandi pri io. Estis ne la unua fojo, kiam Franjo restis ĉe li ĝis malfrua horo nokte, sed ŝia hodiaŭa konduto estis tro neordinara por ke li ne estu kortuŝita kaj maltrankvila pri la amata knabino.

Si venis al li je la 9-a vespere, kaj ili kune vespermanĝis, kiel multfoje antaŭe. Franjo estis tiun vesperon malparolema, iom pli laca, pli pala, serioza, kaj konstante rigardanta unudirekten...

— Franjo — post longa meditado ree ekis Ludoviko — Franjo, ĉu vi eble koleras je mi?

La knabino, ekaŭdinte la lastajn vortojn, haste leviĝis...

Siaj brilantaj okuloj esprimis ian teruran travivaĵon, ian grandan doloron, sekrete kaŝitan...

Si hezitis ankoraŭ momenton, rigardante la kompatindan, kortuŝitan kamaradon, — kaj per nervema moviĝo ŝi ĉirkaŭbrakis Ludovikon fortege...

Ekfluis vortoj torente. Si petis pardonon, — ŝi hezitis ĝis nun, — ŝi ne povis rakonti al li pri la mizerego, kiun ŝi lastatempe travivis...

— Ludoviko plej kara, ĉu mi povus vin koleri?

— Ho, mi malfeliĉa estajo, vi ja nutras min jam de longa tempo... La vespermanĝoj kun vi, estas miaj solaj tuttagaj manĝoj jam de longa tempo... Mi ne volis vin ĉagreni, mi kaŝis la vean veron... Sed nun — plu mi ne povas, la kruela sorto ankoraŭ pli forte min ektuŝis...

mi perdis la loĝejon, la lastan rifuĝejon,
kie mi senĝene povis plori dum tutaj
noktoj... Mi ne havas plu angulon por
kuŝiĝi, mi ne havas plu tegmenton por
ŝirmiĝi kontraŭ vento kaj pluvego...

Si finis — kaj laŭtege, ĝeme ekploris...

Griza, aŭtuna mateno jam leviĝas.

La studenta domo konturiĝas en la gri-
zeco de la foriranta nokto. La silento en

la domkoridoroj estas pli peza, la ĉam-
bro 333, same malluma kaj silenta...

Nur la mateniĝa lumo, enpenetrante
tra l' fenestro, jetas apenaŭ rimarkeblajn
radiojn sur la muron, skizante ombrojn
de du junaj homoj, de Franjo kaj Lu-
doviko.

EL POSTMORTA PAPERUJO DE HELENA HEMPEL.

A. ASNYK.

Praviĝo

Flanken iris de mi forpuŝita
Egoista, plendanta doloro;
Sed el ŝtal' mi ne estas forĝita,
En brust' mia batas homa koro.

Mi do restas sen fort' iafoje,
Sarĝon de ĉagrenoj surportante —
Lacigita, mi falas irvoje,
La kaŝitajn vundojn malkovrante.

* * *

K. TETMAJER.

Aleŝtas ĉiam en mia memor'...

(Muziko de M. Karłowicz)

Aleŝtas ĉiam en mia memor'
Song' paradiza pri ĉarm' kaj belec',
Pri helaj tagoj kun revoj el or',
Kiu min ravis en infanec'.

Kuj ŝajnas foje, ke nur songis mi,
Ke tuta vivo estis nur vantec'
Ho, ci revenu, alloga vizi'
De mia infanec'! —

* * *

Letero de australia senatano M. Abbott al nia samideano F. R. Banham.

La Senato

Ĉambro de la Federaci-Parlamentaj Membroj.
Sydney.

La 7-an de novembro 1936.

Al

Sinjoro Frank Reginald Banham,

Kara Sinjoro!

Mi dankas vin pro via letero de la 3-a
nunmonata rilate al Paul Tarnow. La
broŝureto estas preskaŭ elĉerpita; ĝi es-
tas nun mallonga enkonduko, kiun mi
uzis por prepari la mensojn de miaj kun-
senatanoj. Sed mi kune sendas kun ĝi
la alparolon donitan de mi je la lasta
okazo kiam la propono estis antaŭ Par-
lamento kaj fine akceptiĝis.

Mi estas inudita de Esperanta kores-
pondajo el ĉiuj mondopartoj. Mi ne po-
voscias ĝin traduki, sed amiko ĉi tie bal-
daŭ tion faros por mi.

Ĉar mi ne ankoraŭ fondis ian organi-
zon mi ne povas respondi tiun korespon-
dajn. Sed vere mi funde ŝatas la mi-
rindan, simpatian intereson de viaj a-
deptoj, sed esperas ke ili komprenos ke
**MI NE ADVOKATAS APARTAN SISTE-
MON.**

Ke oni inventas eĉ la plej genian si-
stemon, tio ne estas sufiĉa faro, se ĝi re-

stas nur „pia deziritaĵo”. Estas absolute
necese ke oni akiru mondokonsenton:

- (1) starigi organizacion por elekti ko-
munan instrumenton de pens-inter-
ŝanĝo.
- (2) devigi ĉiujn naciojn, kiam la elek-
to estos farita, ke ili instruigu ĝin
devige en siaj elementaj kaj altaj
(primary and secondary) lernejoj.

Estus necese, ke Esperantistoj, Baz-
Anglistoj kaj la ceteraj pledu sian afe-
ron antaŭ tiu organizacio kaj nepre sub-
metiĝu kaj subtenu je ĝia fina decido.

Mi ne volas advokati iun ajn sistemon
kaj restas neŭtrala.

Dankante vin pro via kuraĝiga inte-
reso.

Mi estas via sincera
Macartney Abbott.

(Noto de la Redakcio. Por komprenigi
al niaj legantoj la sencon kaj signifon
de supre publikigita letero, ni devas kla-
rigi ĝin per jena komento:

La 21. de majo 1936 j. la aŭstralia senatano Macartney Abbott dum sia parolado farita en la Supera Ĉambro de la Federacia Parlamento en Canberra priparolis kaj rekomendis internacian lingvon, kiu servu kiel komuna rimedo por la intersanĝo de pensoj kaj opinioj ĉe estontaj generacioj, tiel forigante la barojn, kiuj nuntempe apartigas la naciojn en la mondo.

La 5. de oktobro 1936 la Senato per

19 kontraŭ 5 voĉoj akceptis jenan proponon de senatano Abbott:

„Por efektiviĝi la forigon de baroj, kaj antaŭenigi reciprokan komprenon kaj pacon inter la nacioj, kaj ebligi starigon de internaciaj publika opinio kaj literaturo, urĝe necesas, ke rimedo de internacia pens-interŝanĝado estu starigita pere de komuna lingvo, kiu estos devige instruata en unuagrada kaj mezlernejoj”.

ĖPITAFOJ

ORIGINALE VERKITAJ DE EUGENIUSZ MATWIEJCZUK

Sur tombo de edzino

Tie kuŝas mia „bela”,
mia „kara” la edzin’,
ĝis la mort’ al mi fidela,
mia „dolĉa” Juliin’.

Pro „bel” ŝia, „svelt” de l’ kano
„mild”, „dolĉec”, „dirmanier”...
certe fugos for satano
kun diabloj el infer’.

Sur tombo de muzikisto

Ĉiu homo min jam konis,
(glor’ min ja prilumis)
ĉar mi bele violonis
kaj harmoniumis.

Sed dum „triloj, pianoj, pretoj”...
kiujn tro mi studis,
mi — vel — mortis, dum intestoj
pro malsat’ ekludis.

VARSOVIO - LULILO DE ESPERANTO

„...kaj bonvoĉu prepari por ekspedo tiujn 200 komunikojn kaj 500 afiŝojn” — diris, forirante, la ĉefsekretario.

Mi restis sola.

Fajfetante, mi komencis skribi adresojn sur kovertoj. Estis jam noktomezo. — Poste mi sidiĝis ĉe monteto da murafiŝoj kaj komencis ilin paki. Samideano el Svedujo petas 10 ekzemplerojn: — farite! Alia el Ĉeĥoslovakujo 30: — farite! Alia el... (jam estas preskaŭ 1. horo nokte, mi oscedas). Alia el Japanujo petas 150 afiŝojn. Mi (denove oscedas) kalkulas: 17, 18, 19, 20...

El Japanujo... Ho, mi tre ĝojus se venus al nia kongreso la simpatia samideano J. T., kiu tiel ĉarme ornamis la Vienan!... kaj s-ino Siri el Svedujo, kaj s-anoj A., B., C.,... el Francujo, el Italujo, el Estonio, el Holando, el...

...Jen ili estas, svarmas en la kongresujo... „Ho, saluton samideano, saluton! Kiel Vi fartas? Denove ni renkontiĝas.” Manpremoj, ĝojo, jubilea agordo; miloj da internaciaj amikoj amasiĝis en la Zamenhofa urbo por festi en plena harmonio sian grandan feston, por spiri aeron de Varsovio, aeron kiun spiris nia Majstro, por promeni tra la stratoj tra kiuj Li ofte rapidis, pensema, al pacientoj, al kiuj minacas blindiĝo, por rehavigi al ili klaran vidpovon...

Rido, tumulto, interkonatiĝo.

„— Unua vizitado de la urbo! — Kiu iras?” Jam formiĝis kelkaj grupoj.

Varsovio (pole Warszawa — legu Varŝava) — ĉefurbo de Polujo — kalkulas nun 1¹/₄ milionojn da loĝantoj. Ĝi rapide modernigas. Oni ne devas forgesi, ke ĝi estis dum pli ol 100 jaroj ĉefurbo de sklavigita kaj dispartigita lando kaj post reliberiĝo en 1918 ĝi komencis novan, liberan vivon.

Ni komencas vizitadon de la „Malnova Urbo”. Ni staras sur la limo de nova kaj malnova parto de l’ urbo, sur „Placo Kastela” (Plac Zamkowy). Jen leviĝas alten 20-metra kolono kun monumento de l’ reĝo Sigismundo III. starigita en 1644 (la sama kiu ornamas nian kongresan afiŝon). Jen granda malnova bruna konstruaĵo — Reĝa Kastelo, alikonstruita en XVII. jarcento, poste denove kelkfoje detruita kaj renovigita. Ni vizitas ĝin interne. Tre interesa kun multaj belaj ĉambregoj, mebloj, pentraĵoj de Bacciarelli, Piersch, Canaletto, skulptaĵoj de Monaldi kaj Le Brun.

De Placo Kastela ni eniras straton de S-ta Johano, kie troviĝas la Katedralo, gota impona konstruaĵo el XIV. jc. Interne interesaj tombomonumentoj, pentraĵo de Raphael, sarkofago kun korpo de mondfama pola verkisto Henriko

Sienkiewicz. — Ni iras pluen. Preskaŭ ĉiu domo parolas per sia historio. Rigardante ĉirkaŭen ni eniras la Ĉefplacon de Malnova Urbo, la plej pentrin-dan parton de Varsovio; mallarĝaj domoj kovritaj de belege koloritaj basreliefaj; ĉiuj domoj tre malnovaj, el XV, XVI, XVII jc. Unu el tiuj domoj (Baryczków) enhavas muzeon, en alia estas fama vinejo de Fukier, fondita en la komenco de XVII jc. Tie oni povas trinki malnovegan vinon aŭ faman polan mielakvon.

Ni promenas tra mallarĝaj stratetoj de Malnova Urbo: Podwale, Kamienna Schodki (Stona Stupareto), ĉarmega Kanonia kaj impresitaj ni troviĝas denove sur Kastela Placo.

Ni iras laŭlonge larĝan straton „Kra-kowskie Przedmieście” kun multaj monumentoj kaj atentindaj konstruaĵoj. Jen monumento de plej granda pola poeto Adam Mickiewicz, jen preĝejo de S-ta Anna en baroka stilo kaj de Vizitandinoj en la rokoka. Jen Universitato, jen monumento de Nikolao Kopernik, la mondfama pola astronomo, apude la domo de Societo de Scienc-amikoj, kontraŭe staras preĝejo de S-ta Kruco kun rimarkinda statuo de Kristo sur la ŝtuparo. La plilongigo de tiu ĉi strato, „Nowy Świat”, kondukas al „Placo de 3 Krucoj” kun preĝejo de S-ta Aleksandro kaj al Aleo „Ujazdowska”. Tie ni vidas dekstre imponajn palacojn, ambasadorejojn, maldekstre belajn ĝardenojn: Ujazdowski, Botanika kaj Łazienki. Tiu ĉi lasta estas la plej bela parko en Varsovio. En ĝi troviĝas (nepre vizitinda) koketa palaco de lasta pola reĝo Stanisłao Aŭgusto Poniatowski, staranta apud lago. En Łazienki estas ankaŭ rimarkinda sentegmenta teatro, simila al grekaj amfiteatroj kaj monumento de Chopin. Ĉe la fino de Aleo Ujazdowska staras empira palaco Belvedero el 1822. jaro, eks-sidejo de l' Marŝalo Piłsudski, nun muzeo kun liaj postmemoraĵoj. Ni revenas al centro de l' urbo tra strato Marszałkowska, ĉe kies fino etendas sin Ĝardeno. Ni haltas iom ĉe str. Królewska 41, la domo kie mortis la Majstro kaj kie nun loĝas liaj infanoj, en la sama loĝejo, plena de karaj por ĉiu esperantisto memoraĵoj. — Tra Saksa Ĝardeno ni aliras al Placo Piłsudski, kie ni vizitas Tombon de Nekonata Soldato kaj rigardas originalan monumenton de Princo Jozefo Poniatowski nacia heroo, skulptaĵo de Thorwaldsen. Apude situas

Muzeo de Belartoj kaj Instituto por Propagando de Arto.

Tra strato Wierzbowa ni atingas Teatron Placon. Tie staras la Urbdomo kaj empirstila „Granda Teatro” (operejo kaj 2 aliaj teatroj). Poste, tra str. Senatorska ni trovas straton Miodowa kun preĝejo de Kapucenoj, fondita en XVII jc. de la reĝo Jan III. Sobieski memore al defendo de Vieno kontraŭ turkaj armeoj. Proksime staras ĉefepiskopa palaco kaj sur Placo Krasiński baroka palaco de Krasiński, kie nun troviĝas la Plej Supera Juĝejo.

Tra ĝardeno de Krasiński ni venas en la hebrean kvartalon. Tie ni trovas facile la straton de Zamenhof kaj historian por ni domon Nr. 9, kie dum multaj jaroj vivis kaj laboris la Majstro, de kie Li sendis en la mondon antaŭ duonjarcento sian „Unuan Libron” de Dro Esperanto. Malriĉa, modesta kvartalo, simpla kiel la tuta vivo kaj animo de l' unu el la plej grandaj filoj de l' Homaro. Ni revenas al centro de l' urbo: Filhramonion, Ĉefpoŝtejon kaj en la suda parto Politeknikon. En la suda antaŭurbo, Mokotów, troviĝas Supera Komerca Lernejo kaj Agrikultura Lernejo.

Specialan promenadon ni faras tra „Aleo de 3 Majo” kaj Ponto Poniatowski al antaŭurbo Praga, kuŝanta sur dekstra bordo de Vistulo. Tie ni vizitas la vastegan belan parkon de Paderewski.

Iun belan matenon la tuta Kongreso-ekskurso al ĉarma Wilanów apud Warszawa, rezidejo de l' reĝo Jan Sobieski. La palaco kaj parko ĉe Vistulo — mirinde belaj kaj romantikaj.

Kaj vespere la ŝipa promenado sur Vistulo! Tion oni ne rapide forgesas...

Jen farita rapidega trarigardo de l' urbo. Ĉiu el vi, Samideanoj, trovos ion speciale interesan por vi. Estas trovebla ĉe ni bona teatro, belaj dancejoj, ĉarmaj inoj, fervoraj esperantistoj...

* * *

Ni denove estas en la kongresejo, amikoj svarmas, ĉiuj ĝojas pro la denova plena konkordo en nia movado, pro la plaĉa kaj gastama urbo...

„Ni kantu nian „Esperon”:

...Tre la mondo iras forta vooookol...

...He; kiu vokas? Estas mi mem! — Kie mi estas? Ha, ĉu eble? Samideanoj el Turkujo, Hispanujo, Anglujo, Argentino... Antaŭ mi — Varsovia Kastelo; alta kolono de Sigismundo... Verda stelilo leviĝas super Varsovon.

Nokto. Mi sidas ankoraŭ en nia LKK-oficejo, tenante en la manoj kongresafişojn. Jam mateniĝas. La verda stelo leviĝas pli kaj pli alten... Ĝi forte radios dum aŭgusto 1937. Ĝiaj radioj denove iros al la Tutmondo el Varsovio...

Samideanoj, venu! Malnova pola proverbo diras: „Gusto hejme — Dio hejme!”

La sanktaj Ombroj de l' Majstro atendas.

Ce Lia Tombo ni ĵuru. Kaj venku!
Lokokero.

OFICIALA KOMUNIKO

N-o 3.

de la Loka Kongresa Komitato
de la XXIX. Jubilea Universala Kongreso
de Esperanto

Varsovio, 7—15 aŭgusto 1937.

LA DEVIZO KAJ LABORPROGRAMO DE LA KONGRESO.

La Loka Kongresa Komitato volas, ke la Jubilea Kongreso estu esence labora kaj organiza. Ni pensas, ke nia movado postulas, ke LA JUBILEA opiniu pri la plej gravaj demandoj de nia nuna movado kaj donu direktivojn por la plua agado en sekvontaj jaroj.

Nia Komitato volus antaŭ ĉio, ke la Kongreso posedu vere jubilean karakteron, metante je la frunto de ĝiaj laboroj esence realigan vortsignalon por la tuta esperantista movado, nome: la enkondukon de deviga lernado de Esperanto en la lernejojn.

Ni pensas, ke dum la tuta Jubilea Jaro nia devo, la devo de ni ĉiuj esperantistoj, estas fari la jubilean kalkulon de nia kvindekjara agado. Ni opinias, ke ne nur la Kongreso, sed ĉiuj niaj landaj, internaciaj, ideaj kaj profesiaj organizaĵoj estas alvokitaj per tiu historia momento, fari tian bilancon.

Volante doni kelkajn ekzemplojn, kiel ni komprenas tiun ĉi historian taskon de la tuta esperantistaro dum la Jubilea Jaro, ni, nur kiel certajn eblojn, formulas niajn perspektivojn por la tri ĉefaj kampoj de nia ĝisnuna movado:

LINGVO.

Sur la kampo de la historio de la lingvo estus dezirinde, ke la specialistoj de tiu ĉi fako, posedantaj sufiĉan sciencan preparon, montru al la publiko esperantista kaj sekve al la alia, kian gradon de la perfekteco kaj de la ĉiufanka riĉeco atingis nuntempa Esperanto, fidele

bazita sur la Fundamento de Zamenhof, danke al multjara praktika uzado same en la ĉiutaga internacia vivo, kiel en la scienco, en la tekniko kaj en la literaturo; en tiuj lastaj regionoj ĉefe danke al laboroj kaj talentoj de la kreintoj de la teknikaj vortaroj, de la tradukistoj de la ĉefverkoj de la universala literaturo kaj danke al la laboro de la originalaj verkistoj.

LITERATURO.

La literaturaj akiroj de l' Esperanto same sur la kampo de la tradukoj, kiel sur la kampo de la originala poezio kaj la prozo, prezentitaj sinteze, — donus la bildon de tiuj multaj profitoj, kiujn danke al Esperanto oni povas ŝui jam hodiaŭ, se oni konas tiun ĉi lingvon.

HISTORIO DE LA MOVADO.

La laboroj koncernantaj la propagandon kaj organizan movadon estus, laŭ nia kompreno, ne nur simplaj monografioj, kiuj estas multe instruantaj por ĉiu movado, sed havos ankaŭ praktikan signifon por la Kongreso, ĉar sur tiu ĉi bazo ĝi eble povus ellabori certajn rekomendojn por la estonteco, por ke nia movado evitu erarojn de la ĝisnuna nia agado, ĉefe la erarojn de la propagando kelkfoje malĝuste direktita aŭ adresita al la medioj malmulte interesitaj pri la problemo de la lingvo internacia.

Metante la historion de la tuta esperantismo en la programon de la Jubilea Kongreso, ni antaŭ ĉio honorigus ĉiujn niajn mortintojn kaj ĉiujn meritplenajn vivantojn, agantojn kaj verkistojn, kiuj dum la unua duonjarcento de nia movado faris de la genia projekto de Zamenhof — lingvon vivantan, lingvon riĉan, tutflankan; ni honorigus la pionirojn de la movado, kiuj vokis al la ekzisto novan, vivan kaj ĉiam pli kaj pli kreskantan lingvan socion.

Fine, la problemo de Interŝtata Akordo pri la enkonduko de Esperanto en lernejojn estus por la programo de la Kongreso kvazaŭ konkludo kronanta ĉiujn ĝiajn laborojn.

Tiu ĉi problemo de granda graveco por la disvastigo de Esperanto devas esti antaŭ la Kongreso ĉiufanke pripensita kaj diskutita en diversaj esperantistaj organizaĵoj en ĉiuj landoj.

La vortsignalo: **ESPERANTO EN LERNEJOJN!** sub kiu devas labori la Jubilea Kongreso, postulas, ke ĉiuj esperantistaj organizaĵoj pripensu ĝin serioze ri-

late al siaj landaj cirkonstancoj aŭ fakaj celoj.

Ni tre dezirus kolekti antaŭ la Kongreso ĉiujn sugestojn koncerne la enkondukon de Esperanto en la lernejojn, kaj ni insiste petas ĉiujn organizitajn samideanojn serioze pripensi tiujn aferojn en iliaj landaj fakaj asocioj kaj alsendi iliajn rimarkojn, sugestojn kaj raportojn antaŭ la 15-a de marto 1937, por ke LKK povu resumi en unu ĝenerala raporto la nunan staton de la afero en la mondo kaj prezenti ĝin al la Kongreso kiel bazon de nia diskutado.

Loka Kongresa Komitato.

POLLANDA KRONIKO

BIALYSTOK. — La Esp. movado laste notinde plivigliĝis. La ŝakturniron je pokalo de la urbestro de Białystok partoprenis ankaŭ la ŝaka sekcio de Zamenhofa Esperanta Societo en jena konsisto: gvidanto — Babkes, anoj: dr. Datner, Nasielski, Grotkiewicz, Bramson, Penski, rezervo: Brakier. La Esperantistoj okupis la duan lokon dum la finrezulto. Tiu fakto estis notita de la tuta gazetaro. — La 4. XII. okazis ĝenerala kunveno de Zamenhofa Esp. Societo sub prezido de dro Datner. La kunveno aprobis la raportojn, prezentitajn de prez. Szapiro, sekr. Lewin kaj kassistino Pomeranc kaj esprimis dankon al la komitato. Poste oni elektis novan komitaton jene: prez. red. J. Szapiro, vicprez. dro Sz. Datner, sekr. M. Lewin, kassistino f-ino E. Pomeranc, mastro A. Jelin, membroj W. Oscwicki kaj W. Messer. Revizia komisiono: J. Sztupler, R. Tanchelewicz kaj f-ino C. Goldberg. La ĝenerala kunveno pritraktis ankaŭ la lastajn okazintaĵojn en Esperantujo kaj aprobis la decidon de la komitato de ZES protesti ĉe PED kontraŭ ĝia eksigo el UEA. — La 15. XII. ZES okazigis Zamenhofan vesperon. Pri la Majstro kaj lia verko parolis prez. Szapiro, deklamis s-ro M. Lewin kaj f-ino C. Goldberg. — La 25. XII. okazis „teovespero”, dum kiu s-ro Kamieniecki interese prelegis pri la radio kaj apliko de Esp. — La societejo estas malfermita ĉiuvespere. Ĉiam troviĝas en ĝi deĵoranta komitatano. Aliurbaj kaj alilandaj gesamideanoj estas bonvenaj. Adreso: Sienkiewicza 35. — Kurso de Esp., gvidata de la instruisto M.

Doroszko, baldaŭ finiĝos. Nova kurso komenciĝis meze de januaro.

KAMIONKA STRUMIŁOWA. — Sian propagandan vojaĝon ekkomencis la konata Lvova ĉefinstruistino Fanjo Steiger, kiu ĝis nun gvidis bonsukcesajn kursojn en la urboj Rawa Ruska, Sokal, Jaworów. En Kamionka Strumiłowa ekestis danke al afabla subteno de ĉefinspektoro s-ro Szeferczyk kaj subinspektoro s-ro Nunberg — 2 kursoj por infanoj kaj plenkreskuloj. F-ino Steiger preparas ankaŭ en Radziechów kursojn. (Rap. Min. Mantel).

KRAKÓW. — La solenan Zamenhofan Vesperon, okazintan la 15. de decembro, d. j. inaŭguris inĝ. E. Tor, direktoro de Industria Muzeo, kiu konvinke parolis pri la interna ideo kaj estonto de Esperanto. La muzikan parton plenumis la konata radio-kantistino s-ino Julia Ilnicka kaj eminenta violonisto prof. Adolf Peters. Tre bone akompanis ilin s-ino Paulina Schneider kaj s-ro Artur Wojtyński.

La 10. k. m. trapasis nian urbon s-ano Stefan Lubliner, membro de LKK el Warszawa. Dum sia mallonga restado en Kraków li vizitis la vicprezidanton de PED, kun kiu li preparolis kelkajn gravajn organizaĵajn aferojn.

La plej populara kaj plej granda gazeto en Polujo „Ilustrowany Kuryer Codzienny”, aperanta en Kraków publikigis en komenco de januaro k. j. ampleksan artikolon pri Esperanto en formo de intervjuo kun s-ro Hans Jacob, direktoro de U.E.A., kiu antaŭ la Kristnasko

vizitis la varsoviajn esperantistojn. La artikolo faris bonegan propagandon.

LWÓW. — En la bela klubejo de „Instytut Muzyczny”, ul. Senatorska 8. ni diligente preparas niajn verdajn taskojn.

La 15. XII. p. j. okazis Zamenhofa Vespero. Kunagis post solena festparolado de nia prezidanto Dro I. Fels la talentoplenaj ge-anoj: Mgr. N. Kleinowa kaj I. Spiegel per pianoludoj, f-ino R. Fitz per kantoj, plane akompanata de sro Fischler, direktoro de „Instytut Muzyczny”, Mgr. R. Silber kaj Keff-Salzmanna: Pol-Esperantaj recitaĵoj, Mgr. N. Herr: Popolkantoj kaj parolado. La finon kronis la simpatia posedantino de la Instituto Muzika, 70-jara s-ino Fischler per bela recitaĵo.

Kurson gvidas Mgr. Natalia Kleinowa. Per agrabla instruado ŝi sukcesas paroligi la lernantojn, kiuj kuraĝe respondas.

S-ro Józef Toczyski gvidas la E-angulon en la gazeto „Skaut” („Skolto”). En la lasta numero aperis letero de la hungara skoltgvidisto Balkányi, poligita de s-ano Toczyski.

WARSAWA. — La 18. 7. 1936 okazis en Varsovio danke al klopodoj de Societo Turisma de Esperantistoj en Polujo kaj Pola Esperantista Societo parolado de s-ano Francisko Szilágyi je temo: „Hungarlando kaj la hungara animo”. La preleginto interese parolis pri sia lando kaj montris al la ĉeestantaro belajn lumbildojn.

La 23. 11. 36 Societo Turisma de Esperantistoj en Polujo kune kun Unuiĝo de Kuracistoj kaj Inĝenieroj aranĝis koncertan vesperon, kiun partoprenis la fama pianisto Artur Balsam kaj konata deklamantino Ludwika Czerwińska.

En la I-a kaj III-a partoj de la Vespero s-ro Balsam pianludis verkojn de Bach, Mozart, Brahms, Debussy k. a., en la II-a parto s-ino Czerwińska deklamis poemojn de Braun, Tuwim kaj Słoniński. La publiko, ravita de belega pianludo de s-ro Balsam kaj de ĉarma deklamo de s-ino Czerwińska, multe aplaudis ambaŭ geartistojn.

Societo Turisma de Esperantistoj en Polujo ĉi-pere dankas kore al s-ro Balsam kaj s-ino Czerwińska por partopreno en la Vespero, kiu postlasis neforgeblan impreson.

En la tuta mondo la 15. XII. estas festata. Sed ĝia soleneco havas specialan karakteron en la lulilo de Esperanto, en Varsovio. Tie ĉi, ĝi estas la sola dumjara festo, en kiu partoprenas en

konkordo eluj varsoviaj samideanoj, sendepende de tio, al kiu societo ili apartenas. Kaj — kvazaŭ simbolo al tiu agordo — tiun vesperon honore prezidas la plej aĝa Zamenhofido — Dr. Adamo Zamenhof.

Nunjare tiu festo portis kvazaŭ demonstracian karakteron. Ĝin aranĝis ne kiel kutime unu societo („Konkordo”), sed la varsovia unuiĝo de la esp. societoj, nomata I. E. D. Intersocieta Esperanto-Delegitaro). Kvazaŭ por montri al la mondo la solidarecon kaj fortan unuiĝon de la societoj.

La vesperon inaŭguris sro Wiesenfeld kaj invitis por prezidi Dron Adamo Zamenhof.

La programon malfermis per „Prologo” f-ino Słuszná. Poste tuŝis la esp. situacion s-o Dratwer. Sekvis bela deklamado de f-ino D-rino Muszkatblat, kiu aŭdigis al ni „Doloron de arbo” — majstran poeziaĵon de J. Wittlin kaj fragmentojn el la laste aperinta Verkaro de FEZ. Sekvis paŭzo, dum kiu estis disvenditaj sufiĉe multaj libroj.

La duan parton de la vespero ree malfermis la ĉarma voco de f-ino Słuszná. Poste — la ĉefnumero de l' programo: prelego de Jean Forge (li mem substrekis ke tiun vesperon li ree estas Jean Forge, ne Fethke). Ĝi estis modelo de arta kaj plenehava oratoreco. Jean Forge ektuŝis la literatur-historion de nia lingvo, ekde la unua interparolado de Grabowski kun nia Majstro ĝis la lasta tempo. Belege kaj nerefuteble li pruvis ke nia lingvo estas en si mem literatura. Kaj tial ĉiuj unuaj pioniroj (Grabowski, Kabe, Zakrzewski, Belmont, kaj multaj, multegaj aliaj) eble senkonscie tiom multe dediĉis sin al la literatura agado.

Per mallongaj vortoj pri la nuntempa stato **Internacia**, pri la esperanta mondkrizo, kaj per la konkludaj vortoj: „**malgraŭ ĉio restos fidelaj**” finis la programon s-o Wiesenfeld.

POLAJ PREMIITOJ

Aldone al la notaĵo pri polaj premiitoj, aperinta en la novembro numero de Pola Esperantisto, ni komunikas, ke dum la samaj Internaciaj Floraj Ludoj en Manresa (Barcelona), sro HENRYK GIELB el Varsovio, pro originala novelo s. tit. LA KRISTNASKO-ARBETO, gajnis la premion de la deputito de Manresa, konsistanta el 50 pesetoj kaj ricevis arte pentritan diplomon.

NOVAĴOJ EL ESPERANTUJO

AŬSTRALIO. — S-ro Inocento Serišev, rusa pastro el Siberio, konata malnova pioniro de Esperanto, vivas nun en Sydney (Aŭstralio). Tie li fondis presejon kaj komencis eldoni Esperanto-lingvan gazeteton sub la nomo „La Pacifiko”. Lia adreso estas: C. P. O. Box 2988.

AŬSTRIO. — Okaze de la 28-a Univ. Kongreso en Wien la urbestro de Klagenfurt decidis alinombri la centre situantan ĝisnunan Gartengasse en Esperanto-strato. La koncerna solenaĵo okazis la 16-an de aŭgusto 1936. kaj ĉeestis ĝin multaj esperantistoj partoprenintaj en la postkongresa vojaĝo tra Aŭstrio.

BRAZILO. — Dum la kongreso de literaturaj Akademioj oni aprobis jenan rezolucion: „La kongreso de Literaturaj Akademioj kaj Kulturaj Societoj de Brazilo, konsiderante la grandan avantaĝon internacie diskonigi la brazilajn literaturajn verkojn, esprimas la deziron, ke la registaro apogu kaj helpu la tradukadon de la plej bonaj en la plej disvastigitajn lingvojn, kaj ankaŭ en la internacian helpan lingvon Esperanto. Sekvas la subskriboj de plej famaj verkistoj.

— Okaze de la IX. Internacia Specimena Foiro, kiu funkciis en la belega Rio de Janeiro, de la 12. de oktobro ĝis la 15. de novembro 1936. la Turisma kaj Propaganda Oficiala Fako eldonis koncernan katalogon. Ĝi enhavis la foiran regularon en franca, portugala, angla, itala, hispana, germana kaj esperanta lingvoj.

ĈEĤOSLOVAKUJO. — La posttagmeza ĵurnalo „Večer”, eldonata en Praha, komencis aperigadi mallongan, sed riĉenhavan rubrikon pri Esperanto. La rubrikon proponis kaj gvidas f-ino Julie Supichová, fakinstruistino en Praha.

DANUJO. — La dana ministerio de instruado la 23-an de novembro p. j. per letero direktita al la direktoro de la Teknika Lernejo en Lögstör esprimis sian konsenton instrui Esperanton en la teknikaj lernejoj por metiistoj kaj faklaboristoj. En Danujo ekzistas ĉirkaŭ 300 tiaj lernejoj.

FRANCUJO. — En la Urbo Hautmont okaze de la nunjara kongreso de la Nord-Franca Esperantista Federacio oni inaŭguris novan belan straton kun la nomo „Strato de Dro Zamenhof, kreinto de Esperanto”.

HUNGARUJO. — Okaze de la hungara katolika landa kunveno estis ankaŭ kunveno de Hungara Katolika Esperanto-Societo sub prezido de prof. Dro A. Marczell. Oni laŭtleĝis leteron de la hungara ĉefepiskopo, princprimato Dro Justinian Serédy, kiu konsentis, ke okaze de la Sankta Jaro je honoro kaj memoro de S-ta Stefano, la unua reĝo de Hungarujo, en 1938. okazu samtempe kun aliaj grandaj festoj Katolika Esperanto-Mondkongreso en Budapeŝto, kaj la ĉefepiskopo akceptos la honoran prezidantecon. En 1938. estos la miljara datreveno de la morto de l' granda reĝo, kiu konvertis al kristanismo la hungaran nacion.

JAPANUJO. — S-ro Maruyama, estro de la Sesa Knabino Liceo en Tokio, faris kuraĝan decidon, kiu estas konsiderata kiel epokfara en la lingvo-instruado en Japanjo. Anstataŭ la angla lingvo, kiu estas en Japanujo ĝenerale instruata kiel unua fremdlingvo, li enkondukis Esperanton kiel regulan lernofakon en la unua lernoĵaro. La instruadon prenis sur sin s-ro Yosi H. Isiguro, konata pioniro de Esperanto, aŭtoro de multaj tutmonde konataj lernolibroj kaj vortaroj de nia lingvo.

NORVEGUJO. — „Fjensyn og Radio” grava radioĵurnalo en Oslo (eldonnumero ĉirkaŭ 55.000) de post aŭgusto p. j. publikigas ĉiusemajne la esp. radioprogramojn. La samon faris jam dum kelkaj jaroj „Radiobladet” kaj „Hallo-Hallo”, ambaŭ en Oslo.

PORTUGALUJO. — La semajna gazeto „Comercio de Povoas de Varzim” kaj la revuo „Pensamento”, aperanta en Porto, komencis publikigi kurson de la lingvo Esperanto.

USONO. — Esperanto-Asocio de Norda Ameriko aranĝis voĉdonadon intersiaj membroj pri aliĝo aŭ ne-aliĝo al IEL. El 120 voĉoj ricevitaĵ, 119 estis por aliĝo al IEL, kaj nur unu voĉo estis kontraŭ.

· UWAGA!

Wszelkie wpłaty abonamentu miesięcznika „Pola Esperantisto” skutecznie można na konto PKO Nr. 406.660 lub przekazem rozrachunkowym, kartoteka Nr. 29. co zaoszczędzi wpłacającym koszty przesyłki.

R A D I O

**Tre interesa disaŭdigo, nuntempa, moderna.
VESPERO DE JOHANO CANKAR!**

Merkrede la 27-an de januaro 1937 disaŭdigos radio LJUBLJANA, (569.3 m, 5 kw) tre interesan esperantan programon. Esperanta klubo, Ljubljana preparas honore al la 60-jara naskiĝtago de JOHANO CANKAR esperantan „VESPERON DE CANKAR”, kiu daŭros 1 horon. Komenco je la 22a, fino ĉirkaŭ la 23a horo.

PROGRAMO:

- 1). Ivan Cankar — prelegos sro Kozlevĉar Joze,
- 2). Poemo — deklamos fino Cukale Ela,
- 3). Servisto Jernej kaj lia rajto:
 - a) Recito el originala novelo — recitos Kozlevĉar J.
 - b) IV-a kanto el „Servulrajto”. Recito, servulo, juĝisto muziko.
 - c) Patro nia — Servisto, ĥoro kaj studento.

Kunlaboras la geanoj de Esperanta klubo, reĝisoras drama aktoro Potokar Lojze.

Gesamideanoj tutmondaj! Aŭskultu Ljubljanan! Vi aŭdos mirindan kanton al laboro. Vi ekkonos grandan animon slovenan. Sciu, Johano Cankar estas verkisto, poeto mondfama.

Esprimu dankon al la stacio, kiu tiel favoras Esperanton!

Esperanta Klubo Ljubljana.

H E L P U N I N !

Anstataŭ skribi senpere al „Polskie Radio” kaj peti de ĝi kontinuaĵon de disaŭdigado de esp. prelegoj, la landaj asocioj kaj unuopaj grupoj sendu al plej proksima pola konsulejo memorskribon kun esprimoj de bedaŭro, ke „Polskie Radio” ĉesigis esp. prelegojn, kiuj efike diskonigadis inter Viaj samlandanoj interesajn informojn pri kultura vivo, e-

konomia stato, geografio, turismo de Polujo k. s. **Ne forgesu menci**, ke estus nekomprenebla neglekto flanke de „Polskie Radio”, se ĝi ĝuste en la jaro de Jubilea Kongreso en Warszawa ne farus propagandon por instigi eksterlandajn esperantistojn al plej multenombra partopreno en la solena internacia festo.

Ne prokrastu! Skribu tuj! Ni kore dankas!

Pollanda Esperanto-Delegitaro.

HALINA WEINSTEIN, Warszawa, str. Leszno 90, m. 5, tel. 5-98-37, PKO-konto 27.867 akceptas abonojn por jenaj gazetoj:

Pola Esperantisto jare zł. 8.—; duonjare zł. 4.—; kvaronjare zł. 2.—; unu opa numero zł. 0.70.

Literatura Mondo jare zł. 15.50;

La Praktiko jare zł. 8.—; duonjare zł. 4.—; unu opa numero zł. 0.70. Abona jaro komenciĝas en januaro kaj julio.

Por poŝtelspezoj ĉe mendo de apartaj numeroj aldonu 10%. Por korespondaĵo nepre aldonu ĉiam poŝtmarkon.

Riceveblaj kaj mendeblaj ĉiuj eldonaĵoj de Literatura Mondo, La Praktiko k. a.

Ne povante respondi al ĉiuj aparte la Redakcio dankas sur tiu-ĉi vojo tutkore al ĉiuj abonantoj kaj legantoj, kiuj esprimis al ĝi bondezirojn okaze de Kristnasko kaj Novjaro.

ABONU MEM KAJ VARBU POR „POLA ESPERANTISTO”! VI LEGOS ĈIAM INTERESAJN NOVAJOJN PRI LA LANDO DE JUBILEA KONGRESO!

PRENUMERATA: rocznie zł. 8.—, półrocznie zł. 4.— Dla Towarzystw i grup esper. rocznie zł. 6.— Zagranicą: 5 fr. szw. Numer pojedynczy zł. 0.70. podwójny zł. 1.40.

OGŁOSZENIA: 1/2 strony zł. 30.— 1/4 strony zł. 15.— 1/8 strony zł. 10.— Korespondencja: małe ogłosz. z 10 słów (prócz adresu) zł. 1.—

PRZEKAZ ROZRACHUNKOWY, KARTOTEKA NR. 29. --

ABONO: jare zł. 8.—, duonjare zł. 4.— Por societoj kaj grupoj esperantistaj jare zł. 6.— Eksterlande 5 sv. fr. Aparta numero zł. 0.70 duobla zł. 1.40.

ANONCOJ: 1/2 paĝo zł. 30.— 1/4 paĝo zł. 15.— 1/8 paĝo zł. 10.— Korespondado: anonceto de 10 vortoj (krom adreso) zł. 1.—

KONTO P. K. O. NR. 406.600.

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: KRAKÓW. LUBICZ 34.

